Pottier

FN PER ANC 47

# NORMANDA ESPERANTO-BULTENO

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO N° I7

SEPTEMBRO I97I.

**Redaktas:** S-ro JOUIS E. - 62I Rue Georges Mugnier - 76 BOISGUILLAUME.
Sendu la manuskriptojn antaŭ la I0a de Februaro, I0a de Majo, I0a de Aŭgusto, I0a de Novembro.

E N H A V O

- Jam forpasis la ferioj.
- Universala Kongreso en Londono.
- Kongreso de T.E.J.O. en Edinburgo.
- Kulturaj semajnoj en Gresillon.
- S.A.T. Kongreso en Parizo.
- Feliĉaj okazaĵoj.
- Vivo de la Grupoj.

## JAM FORPASIS LA FERIOJ.....

Jam forpasis la bela epoko de la ferioj, agrabla tempo de ripozo ĉu hejme, ĉu, pli ofte, en loko malproksima, kie, laŭ siaj personaj gustoj kaj profesioj, oni ĝuas banadon, ekskurson, grimpadon, aŭ,nur, tute simple, meritan ripozon.

El la multaj eblaj feriaj lokoj, kelkaj el ni elektis urbojn, kie okazis internaciaj kongresoj aŭ renkontiĝoj, kiel Parizo, Londono, Edinburgo, Gresillon aŭ Primoŝten. Legante iliajn impresojn en tiu bulteno vi povos konstati, ke ankaŭ en Esperantujo oni povas travivi ne nur tre interesajn, sed ankaŭ tre agrablajn feriojn en plej amika internacia etoso.

Sed nun la ferioj estas for, kaj ĉiuj denove laboras. Ankaŭ ni Esperantistoj devas rekomenci la laboron. GRAVAJ TASKOJ atendas nin: trafa kaj lerta propagando, bonaj kaj allogaj kursoj, interesaj grupkunvenoj.

La laboro ne mankas.

KURAĜE ANTAŬEN!!!!!!

## - LONDONO KAJ EDI BURGO KONGRESIS.

Kiel ĉ uj jam scias Londono estis elektita por la U versala Kongreso de Es era ito.

Pri la pro ram kaj diversaj aspektoj de tiu Kongreso, silas al vi legi artik lo de lertaj jurnalistoj. Sed permesu al m ke ankoraŭ foje ( la ia mi ĝuis bonan etoson kaj malkovris nov resojn specialajn por i kaj la britan vivon tiel diferenca ol la daŭrinde la vetero ne stis tre bela ( kiel ĉiam en Londono!) Al n-greso, do, partoprenis mul taj genormandoj kiel, Finoj Bonnet Syl Fabienne el Les Andel , inoj Vincent el Les Andelys, Lucas el Fino Renard el Honfle kaj ŝia amikino Sino Rault el Lisieux; Carré Jean-Louis el Sa te ille kaj Duchesne Jean-Pierre el Louvet lernis esperanton nur um I jaro kun ia amiko B. Saunier el Louve la esperanta movado en No mandio estis reprezentita kaj tiel an viglecon.

En Edinbu o, kvin normandaj gejunuloj ĉeestis la Ju n-greson, Fino Bonnet, oj Duchesne, Leroux kaj Saunier.

Kiel mul aj, la Normandoj pli ŝatis viskian vespe

Sro Saunier B.

---

## -KULTU J SEMAJNOJ EN GRESILLON.-

Unua Periodo.

Mi alven e Gresillon por la kvina fojo. Nenio ŝ arbaro, la lageto, ka la personoj. Mi revidis S-ron Babin, kiu g trian kurson, S-ron T ier Y, kiu gvidis la duan kaj S-ron Magadur vi-dis la unuan. La unu kurso estis laŭ la aŭdvida metodo.

La sonor o aŭre sonoras je la oka kaj duono por la ĝo kaj je la naŭa kaj luo o por la leciono. La kurso daŭras de Ho poste, ni tagmanĝas. ost la tagmanĝo, ni povas fabriki emajlojn, la korbfaradon aŭ bindad . ost la vespermanĝo, okazas vespero kun Schwartz ( S-ino Gros , -ro Guillaume), ludoj kaj prezentadoj de de filmoj.

Post tri sem jnoj en Gresillon, mi revenis gaje.

SCHREIBER Lisbeta, I5 jara Les Andelys.

## Dua Periodo.

Sinjoro Colleu ( staciestro ) kaj mi pasigis kelkajn tre agrablajn tagojn en Kastelo de Gresillon fine de Julio. Mi unue havis la plezuron renkonti Gesinjorojn Pottier, kiuj restadis en la parko de la Kastelo sub belega tendo. Poste S-ro Colleu ĝoje rekontaktiĝis kun germana fervojisto, kiu partoprenis kun li en Fervojistaj Kongresoj ( Avignon, Rimini ) Ankaŭ mi retrovis tie malnovajn amikojn el Francio kaj eksterlando. Regis la kutima familieca etoso.

Matene okazis interesaj paroladoj: pri prahistoria arto ( kun belaj lumbildoj) teatro, lingvaj en Jugoslavio, nuntempa ĝardenkulturo K.T.P. Ankaŭ la vespermanĝo estis agrablaj subĉielaj diskutoj pri la matene pritraktita temo. Post la manĝo okazis filmoj esperanto parolantaj, lumbildoj, teatraĵetoj ( luditaj de la infanoj de Geoj Pottier). Multaj samideanoj partoprenis en ekskursoj al la belega spektaklo " Sono kaj Lumo " de Kastelo de le Lude( situanta je nur 22 kilometroj ) kaj al la famaj Loire-valaj Kasteloj.

Mi aparte notis la ĉeeston de paro: la edzo estas portugalo, la edzino belgino ( Flandrino). La ok-jara filino bone parolis esperanton. Partoprenis la restadon ankaŭ juna japanino survoje al la Universala Kongreso al Londono. Plie, juna Jugoslavo kaj lia hispana fianĉino elektis la Kastelon Gresillon, por trapasi ĉi-tie kelkajn liberajn tagojn.

Pri tiuj tagoj pasigitaj en internacia etoso, en kvieta," dolĉa" pejzaĝo ni konservas bonegan memorion.

S-ro LEGRET A.
el Vire.

.................................................................................................

## S.A.T. KONGRESO EN PARIZO.

La 1an de Aŭgusto, mi partoprenis en la Solena Malfermo de la S.A.T. en Parizo. Tie mi deziris denove renkonti samideanon T. MATHIERSON malnovan amikon, tre fidelan korespondanton ( de 1950 ). Mi facile rekontaktiĝis kaj ĉeestis la Malferman Kunvenon en la impona Granda Amfiteatro de Sorbonne. Tie kolektiĝis pli ol 500 samideanoj el multaj landoj. Inter la estraro estis samideano Waringhien. Salutparolis multaj esperantistaj delegitoj, ankaŭ neesperantistaj delegitoj de francaj asocioj simpatiantoj al S.A.T. Poste la partoprenantaro estis fotografata sur la korto de Sorbono. Posttagmeze okazis interesplena viziito de Muzeo de Louvre.

Impresis min la tute amika, frateca etoso de la Kongreso.

S-ro LEGRET. (el Vire)

# V I V O  D E  L A  G R U P O J.

## - V I R E -

La noveldo ita faldfolio pri Vire surhavas Esperanto-tekston bone lokitan apud la ngla-kaj la german-lingvaj tekstoj.

S-ro Lanta gne sendos al ni la materialon por ekspozicio pri la Esperanta Libro. T. un ekspozicion ni intencas prezenti en la urba junular-domo post la fi o de la feria sezono.

Denove ape os reklama-teksto pri Vire en la Jarlibro de U.E.A. 1972.

Sinjoro Co le kaj Sinjoro Legret partoprenis en la Internacia Renkontiĝo en Kastelo de Gresillon fine de julio dum kelkaj tagoj. Il tie ĝuis la kutiman, fami ian, agrableg an etoson de la Kulturdomo.

Car la Dir ktoro de la Turisma Oficejo de Vire tre favoras al nia afero, estas nece e, ke multaj samideanoj partoprenu en la Federacia Kongreso okazonta en ire en 1972. Krome Vire estas centro de regiona interesa laŭ turisma ka gastronomia vidpunktoj.

S-ro LEGRET.  VIRE.

## - R O U E N -

Dum la fe io . Rueanoj partoprenis Kongreson, kaj du el i i eĉ vizitis la Espe antistan Tendejon, en Primoŝten.

## - L E S  A N D E Y S. -

Ofte en l entreprenoj, somero signifas malpli da aktiveco, male, en nia Esperant -Rondeto, la feriotempo ŝajne donas al ĉiu pliam e- nergion. Ĉijare, jam omence de Julio, du el niaj junulinoj, Veronika Pannier kaj Lisbeta Schr iber, pasigis tri semajnoj en Gresillon; dume, Silvia kaj Elina Bonnet artoprenis seminarion pri la lingva problemo sur la insulo Samos ( Grkujo ). La U.K. en Londono atingis rekordan partoprenon de 6 el niaj anoj, in er ili 3 en la infankongreso, nome Katerina Kieffer Martena kaj Maria-Kri tina Got; la 3 aliaj en la U.K. mem, nome S-ino Vincent, Silvia kaj Fabi nne Bonnet; tiuj du lastaj partoprenis poste la TEJO Kongreson en Edinburg dum S-ino Vincent ripozis en la lasta Gresillon-a periodo. Por fini tiu mallongan raporton, mencinda estas la fakto ke Silvia Bonnet deĵoras kiel oficistino en la C.O. de U.E.A. en Rotterdam ekde la 25a de Aŭgust .

Informojn ri la novaj kursoj ni ankoraŭ havas. Bonvolu no i

ke la Kulturcentro de Esperanto aranĝos komunan tagmanĝon la 10a de Oktobro, je la 12-a horo en restoracio " Le Pavillon ", por celebri la 20-an datrevenon de tri el siaj membroj. La nuna prezo estas 15 Frs. Bonvolu anonrivin antaŭ la 8-a de Oktobro al Centre Culturel et d'Amitié Internationale Zamenhof, _ Bd Nehou. 27 - LES ANDELYS.

S-ino Vincent.

## - L E  H A V R E -

La Havra Esperantista Grupo aranĝis gravan kaj interesan ekspozicion en la Salono Franklin, de la 10a ĝis la 12-a de Septembro. La sama ekspozicio okazis ankaŭ en la kvartalo Caucriauville la 25-a kaj la 26-a de septembro.

Kelkaj Esperantistoj el tiu urbo partoprenis diversajn Kongresojn: Unue la Universala Kongreso en Londono, due la SAT Kongreso en Parizo, kaj ĉeestis ankaŭ la S.A.T.an post-kongreso en Gresillono.

## - Y V E T O T -

Post diversaj restad-ferioj en kongresoj, ( Londono, Edinburgo kaj S.A.T. en Parizo) ripoz-tagoj en Grsillon; la grupo denove laboras por nia movado. La unua kunveno de la estraro por la jaro 71 - 72 okazos Sabaton 9an de Oktobro ĉe G-roj POTTIER.

P. POTTIER.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## - F E L I Ĉ A J  O K A Z A Ĵ O J. -



Bonan Venon al......

Christel, filino de Annick kaj Jean-Marc DELCROIX 21 - 9 - 1971.

Carole, dua infano de Catherine kaj Roland FERCOQ.

Al niaj geamikoj ni sendas niajn gratulojn, kaj deziras multe da feliĉo al la beboj.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-



GEEDZIĜOJ

La 17a de Julio okazis en Auzebosc, vilaĝeto apud Yvetot okazis la geedziĝo de F-ino Jacqueline Godefroy kun S-ro Desansac.

Al la nova paro, kiun ni gratulas, ni deziras multe da Feli

Kun Granda Plezuro;

Sinjoro Bernard Saunier

kasisto de la Kultura Centro de Esperanto de Yvetot sciigas al vi sian baldaŭan edziĝon kun

F-ino Elouard Marie-France.

Gi okazos en la Preĝejo Sankta Petro en Yvetot la 6-an de Novembro 1971, je la 16a.

Ĉiuj geesperantistoj estas invitataj al la Honora vino, je la 17-a ( post la diservo) en la Junularkunvenejo en Louvetot( je 6Km el Yvetot.

Sro SAUNIER Bernard.

Louvetot 76 e CAUDEBEC en CAUX.

°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×°×

Laù peto de kelkaj personoj, ni publikigas ĉi-poste la [illegible]tan liston de la abonantaro. En kazo de adres-ŝanĝo, bonvolu informi [illegible]n.

Notu ke la litero " R " montras la respondeculo de la gr[illegible]o.

El la ĉi - su[illegible] listo montriĝas, ke en kelkaj urboj tro[illegible]ĝas pluraj izolulo j.

Ili nepre kuniĝu por starigi grupon.

U N U E C O   E S T A S   F O R T O.

NI RIDU IOMETE.........

Oni demandas la skolton, kial li aĉetis al sia amik[illegible]no ruĝan lipfarbon por nomtaga donaco.

Tial, li respondas - ĉar ĝi estas sola [illegible]naco, kiu [illegible] post iom en etaj detaloj, mi ricevos de ŝi.

---

En la frenezulejo, vizitanto alparolas flegaton ; kiu laboras en la ĝardeno kaj plugas fragojn.

Ĉu vi kutimas sterki la fragojn?

Ne, respondas la flegato, mi surŝutas suker-pulvoron. Sed mi estas [illegible] frenezulo.........